

Notoj de la redaktoro

Inter diversaj sferoj de la homa agado, ĉiam pli grava fariĝas la korp-kulturo. Sub ĝi oni komprenas korp-edukon, sporton, difinitajn formojn de danco, sindefendon, kuracan korp-edukon k.t.p.

Aplikado de Esperanto sur ĉi kampo ne estas kontentiga ĝis nun. Sendube tre grava unua paŝo por plibonigi la nuntempan staton montriĝas publikigado de science altnivelaj artikoloj pri la korp-kulturo.

Jen kial SCIENCA REVUO dediĉas tiun ĉi kajeron al la menciita sfero. Interesatoj pri unuopaj fakoj de la korp-kulturo kontaktiĝu kun la redakcio. Se la reeĥoj estos konsiderindaj, certe baldaŭ sekvos plua korp-kultura kajero. Eĉ oni povas esperi, ke fondiĝos Korp-kultura Sekcio de ISAE, kiu eldonados sian propran fak-revuon.

O. Knichal

(venas de p. 187)

přibližně 1/100 s. Pokud by mělo jít o přesná měření, je třeba činit korekce na kolísání frekvence změn napětí v síti. Metodu autoři demonstrují na příkladu měření trvání některých základních úderů používaných v braně. Pro přímý úhoz tak byla naměřena doba trvání 0,13 s, pro úhoz shora 0,11 s, úhoz stranou 0,16 s a kružný kop zdola do úhlu 45° 0,16 s. Tyto údery byly prováděny stínovaně. S výjimkou přímého úhozu se úderová plocha zastavovala daleko za myšleným cílem úderu. Pro srovnání je uvedeno ještě trvání kružného kopu zdola do úhlu 45° do podložky. Akce trvá 0,16 s.

INTELESKO

INTERNACIA ELEKTRONIKA ESPERANTO-KOMPOSTADO

GERSI ALFREDO BAYS
Caixa Postal 49
BR 89800 CHAPECÓ — SC
B R A Z I L O

Simple metodo por mezurado de la daŭro de frapoj

Václav Hník (Ĉeĥoslovakio)*

Ivan Jindřich

Jaroslav Pospíšil

1. Enkonduko

Dum instruado de la sindefendo oni tre ofte bezonas scii, kiel varias la rapido de batalagoj, efektivigataj de unuopaj disĉiploj dum la ekzerco-proceso aŭ sekve de efiko de diversaj faktoroj (laco, grandeco de ekzerco-dozoj, antaŭ-ekzercoj k.t.p.). Simila situacio estas ankaŭ en la batal sportoj (ĵudo, karateo, bokso k.t.p.). La metodoj, kiujn oni uzadas por mezuri rapidon de la batalagoj aŭ pli ĝenerale la movoj, ne estas ofte por kutimaj bezonoj de trejnistoj tre oportunaj, ĉar ili estas relative komplikaj, multekostaj kaj temporabaj. Tial ni klopodis apliki al ĉi celo simplan metodon, kiu ebligas mezuri daŭron de kutimaj batalagoj, en la sindefendo antaŭ ĉio de la frapoj, kun precizeco de proksimume 1/100 s per rimedoj ordinade atingeblaj. Fine ni elektis fotadon de movo, markata per lumo de eflua tubo. La metodo estas oportuna por mezurado de la daŭro de ne tro ampleksaj movoj, kiujn oni efektivigas en ebena. Plimulto de frapoj plenumas tiujn ĉi kondiĉojn. Tamen eĉ iuj gravaj eroj de **rompumoj**** kaj **faligumoj**** estas efektivigataj en ebena; la priskribata metodo estas do pli ĝenerale aplikebla ol nur por mezurado de rapido de la frapoj. Eksperimente ni elprovis la metodon en la rondeto de la **branao***** ĉe *TJ Tatra Smíchov* en Prago. Nun ni la metodon koncize priskribos.

2. Eksperimenta parto

Sur oportunajn lokojn de la korpo de provatulo oni alfiksu la efluvajn tubojn. Kiel estas konate, la frekvenco de la alterna kurento estas 50 Hz. Sekve la encirkvitigita eflua tubo ekbrilos 100x dum unu sekundo. Se oni nun fotas

* Asistanto ĉe Katedro pri la teorio kaj projektado de arĥitektaj konstrukcioj, Fakultato de Arĥitekturo, Teĥnika Altlernejo en Prago.

** Ni uzadas en tiu ĉi artikolo fakajn terminojn, kiujn proponis en siaj verkoj *J. NOVÁK - I. ŠPIČKA* 1977, 1978. Laŭ ili la **rompumo** estas ajna batalago, per kiu oni celas aŭ teni la kontraŭulon en senpova pozicio, aŭ elartikigi lian membron. La **faligumo** estas batalago, per kiu oni jetas kontraŭulon tere. La **branao** estas ĉefa formo de la karateo (ĉeĥe: *brana*).